

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## “kun la belgoj” kaj “pri sia sperto”

**\*jun.28 [KK] Speciala klaso kun belgaj esperantistoj**

51-jara s-ro Bart Demeyere kaj lia 18-jara filo Thomas. Ili dum japana vojaĝo tranoktis ĉe s-ro Tanigawa Hiroshi de nia rondo.

Malfeliĉe en tiu tago, alveno de Tajfuno n-ro 12, internacie nomata Jongdari (ĵongdari) minacis ataki nian urbon precipe en vespero. Tial ni rezignis pri vespera festenado kun ili, kaj havis komunan lunĉon, proksime de nia kunvenejo, kaj entute 7 kunmanĝis. Poste, de 15h00 ĝis 17h30, ni aŭskultis kunkomputilan prezentadon de Bart, unu horon pri la urbo Bruĝo, en kiu li kreskis kaj loĝas. La postan duonhoron pri komputila programo “Vivo” (pri kio aperis artikolo en nia junia n-ro). Tion ĉeestis 11 personoj – ja tiam kelkaj el niaj membroj estis en Portugalio por la 103a Universala Kongreso.

Cetere, la belgoj alvenis Japanion en la 3a de julio, kaj forlasis ĝin en la 1a de aŭgusto, do longa vojaĝo, kaj Jokohamo estas proksime de la fino de la vojaĝo.

**\*sept. 1 [KK] La kunveno raporti siajn spertojn**

De 13h00 ĝis 17h30, 11 el niaj rondanoj parolis Esperante pri sia sperto precipe en la somero, ĉu pri Esperanto, ĉu pri aliaj temoj. Ĉeestis 19 personoj. Jen estas la repertuaro, kaj ni esperas poste prezenti kelkajn el ili.

(Parolintoj kaj la temo)

1. MIYAKAWA Masako: pri someraj tagoj
2. ISIGURO Tomoko: pri mia bofratino
3. KAYAHARA Rieko: En Lisbono (anstataŭlegita)
4. AIDA Kiyoshi: Mia kariero de Esperanto  
[paŭzo kaj interparolo]
5. IWAYA Mituru: Palaco Pena kaj Palaco Alhambra
6. DOI Ĉieko: (1) La familio de Kleemann vizitis Japanion (2) La 103a Universala Kongreso de Esperanto
7. DOI Hirokaz: Vojaĝo al Eŭskio post la UK  
[paŭzo kaj interparolo]
8. MURATA Kazuyo: Mia korespondanto s-ro Josef Kritz
9. MIYAZAKI Hideko: La unua kurso de Jida lingvo (Yiddish) por mi
10. SIBAYAMA Zyun'iti: Vortar-faraj konsideroj
11. FUSE Kentarou: La vojo al Kanazaŭa

**\*sept. 8 [KK] La 112a Legokunsido**

Diskutita estas pri “La nanoj en domo kun granda zerkovo”. Ĉeestis entute 7, inkluzive de s-ino Itabaŝi Micuko, la tradukinto.



Bart Demeyere

Thomas, la filo

## Omage al s-ro Koyama Takesi

Kiel ni jam informis, nia membro, s-ro Koyama Takesi forpasis en junio. Li, naskita en 1933, eklernis Esperanton en nia rondo en 1989, kaj daŭre estis nia fidela membro.

Ĉi-numere, ni publikigas liajn du eseojn, kiujn li faris en la lernogrupo "Salono". Unu el la eseoj temas pri lia pasinteco, familia rememoro, la alia pri lia nuno, sperto en UK – pardonon al li, ĉar ni elektis eseon pri lia malsana stato, sed li poste priskribas tion kun humuro.

### ⟨ Eseo 1 ⟩ Mediteto sur hospitala lito en Hanojo

Dum la 97-a Universala Kongreso en Hanojo, Vjetnamio, mi devis enhospitaliĝi pro senkonsidera kaj neprudenta agado.

En la 31a de julio, antaŭtagmeze mi enhospitaliĝis en unulita ĉambro, kaj mi trankvile kuŝis sur lito ricevante gutinjektadon. Noktmeze mi aŭdis nenion kaj mi nebule meditetis pri ĉi-foja malsano.

Kio estas la kialo de mia laksego? Mi cerbumis ĉu ĝi estis pro trinkaĵo aŭ manĝaĵo.

Mi rememoris, ke nia ĉiĉerono diris al ni pri atentaĵoj por bonvojaĝi en Vjetnamio survoje al hotelo de la flughaveno Hanojo antaŭ 4 tagoj:

“Ne trinku akvon, nepre prenu mineralakvon

sufiĉe. Ne manĝu nekuiritan legomon, kompreneble ne tro manĝu, eĉ se tre bongustaj manĝaĵoj atendas vin.” Sed mi stulte tute forgesis la konsilon. Mi supozis jene:

1) Trinkaĵo: Mi trinkis nur mineralakvon, sed mi ne trinkis sufiĉe ĝin, ĉar mi kutime trinkas akvon limigite pro ofta urinado.

2) Manĝaĵo: Mi manĝis pli multe ol en hejmo, ĉar la manĝaĵoj en vojaĝo estis tre bongustaj kaj mi multe preferas manĝaĵon ol alkoholaĵon.

3) Aliaj: Ĉu mi misuzis klimatizilon en ĉambro (tro malalte)? Mi estis tre laca.

Post iom da tempo mi demandis min kion mi devos fari, kion mi povos fari. Kaj mi meditetis.

1) Ĉu mi devos pensi pri la plej malbona okazo? Kion fari? Mi abrupte rememoris, ke estimata s-ro Macumoto forpasis en Berlino dum la UK 1999. En la mateno de tiu tago li agrable matenmanĝis babilante kun ni en restoracio de hotelo proksime de la kongresejo.


2) Se mi estos en la hospitalo 5-6 tagojn sen resaniĝo, mi devos reveni sola hejmen.

3) Se mi estos en la hospitalo 3-4 tagojn kaj resaniĝos, mi esperos reveni al Japanio kun la grupo A de JEI-karavano.

4) Se mi estos en la hospitalo nur 1-2 tagojn kaj tuj elhospitaliĝos, mi ripozos sufiĉe dum kelkaj tagoj kaj resaniĝos, mi deziras partopreni en la postkongreso 1 kun kamaradoj de grupo B.

Feliĉe en la sekva tago mi elhospitaliĝis antaŭtagmeze post nur unutaga restado en la hospitalo enhospitaliĝo. Poste laŭ la plano mi vojaĝis en Ho-Ĉi-Min-urbo kaj Kamboĝo.

la 7-an de septembro 2012



### ⟨ Eseo 2 ⟩ Rememoro pri mia avino

Lastatempe mi rememoris pri virinoj en kamparo. Do mi parolas pri mia avino, kiu fakte estis fratino de mia avo.

Ŝi edziniĝis al s-ro B en najbara vilaĝo 5 kilometrojn fora. Kompreneble ankaŭ ŝi edziniĝis laŭ la rekomendo de la gepatroj kaj svatanto, kvankam ŝi neniom sciis pri la estonta

edzo. La geedziĝo estis kuniĝo de 2 familioj kun kutima nupta festeno. Ŝi fariĝis unu el anoj de la granda familio B kaj laboris longe obeante al la gebopatroj. Poste oni diris ke ŝi estis tre bona laborema bofilino, kiu eltenis severan konduton de la bopatrino.

lun frumatemon en somero mi biciklis al

la familio B trans rizkampo laŭ la vilaĝlima rivero Arakaŭa por sciigi morton de mia avo. Mi revenis hejmen kun kara avino. Tiam mi estis 13-jara. Kiam mi pedalis fervore rajdigante ŝin sur malgranda ŝarĝilo de la biciklo, ŝi admonis min de dorse. “Ne diru la vorton <Morto>, eĉ se malsanulo jam mortis. Vi devas diri ke li estas tre grave malsana.”

Kiam ni alproksimiĝis al la rivero de vilaĝa limo, ŝi parolis pri la pasintaj tagoj. “Mi kelkfoje venis al la rivera digo kaj sur ĝi mi larmis rigardante al la naskiĝloko kun deziro reveni. Sed mi ne transiris la riveron, ĉar mi ne volis maltrankviligi miajn gepatrojn kaj mi timis, ke oni ne akceptos la repudiitan virinon en la vilaĝo.”

Tio estis neforgesebla afero por kamparana

bofilino. Mi ne sciis suferintan avinon, sed nur bonkoran avinon.

Poste mi pensis, ke forlasi la edziniĝintan familion estis tre malfacile por tiamaj virinoj kun severa sorto en la japana familia sistemo.

Post la Dua Mondmilito la familia sistemo estis abolita en Japanio, kaj oni povas geedziĝi en nur reciproka interkonsento. Lastatempe multaj junuloj libere, facile geedziĝas kaj eksgeedziĝas, dum negeedziĝantoj multiĝas iom post iom. Amaskomunikilo ĉiutage disvastigas geedziĝajn novaĵojn pri t.n. famemulo.

Supozeble oni iam dismembrigos familion kaj la vortoj “edzo kaj edzino” malaperos. Tiam oni uzos la vorton “kunvivanto” anstataŭ ili. Ĉu tio estas mia bagatela iluzio?

la 10-an de marto 2013



## Feliĉan Naskiĝtagon al “Kotonoha Amrilato”

Nia rondo sendis gratulan mesaĝon por la unua datreveno, nome je la 25a de aŭgusto, al japana komputila ludo “Kotonoha Amrilato”, kaj tiu mesaĝo enkadrigita en la Tvitero de la ludo aperis, kiel montrite en la bildo.

Sed, entute pri kio temas?

En 2017, kiel produkto de la komputil-luda komercmarko SukeraSparo aperis ludo, nomata “Kotonoha Amrilato”. En la ludo, 17-jara knabino nomata Rin subite eniras en la alian mondon, kie aĵoj tute similas al tiuj en la ĝisnuna vivo, sed la lingvo ĉirkaŭ ŝi estas tute fremda al ŝi. La knabinon gvidas alia knabino, 14-jara Ruka, pri la nova lingvo nomata Juliamo. La komputil-ludantoj samtempe lernas tiun Juliamon.

Fakte, tiu nekonata lingvo estas Esperanto, kaj la prototipo aperis en la 26-a de julio, kun klara konscio pri la naskiĝtago de la “Unua Libro” de Esperanto. La oficiala naskiĝtago de la ludo estas tamen la 25a de aŭgusto. La ludo havis certan eĥon en Esperantujo, kaj inter japanaj esperantistoj estas kvanto da ludantoj.

Krom tio, la ludo havas rilaton al

Jokohamo. Nome la stratoj en la alia mondo havas modelon en tiu ĉi urbo, precipe la stacio Ŝin-Sugita. Pro tio tekstas la gratulaj vortoj jene:

“Gratulon al la naskiĝdato de Amrilato el la urbo Jokohamo: tie Ŝin-Sugita kaj la ĉirkaŭo donis inspiron al la urbo de Rin kaj Ruka!”

Cetere, antaŭ jaro, la ludo estis nur por Vindozo, sed nun ĝi estas ludebla en lertaj telefonoj. Kaj ĉi-aŭtune oni anoncis aperigon de la daŭrigo de la ludo nomata “Icukano Memoraĵo” (t.e. lama Memoraĵo).

(raportis Sibayama Zyun’iti)





# Sinsekvas naturaj katastrofoj en Japanio! Kiel vivi?

Doi Ĉieko

En Japanio okazas naturaj katastrofoj pli ofte ol alilande. Loĝantojn en Japanio multe suferigas la katastrofoj: tajfunoj, pluvegoj, multaj neĝadoj, inundoj, tertremoj, cunamoj, erupcioj de vulkanoj ktp.

Japanio havas teron je nur 0,28 % de la tutmonda, sed Japanion atakis 20,5 procentoj de la tutmondaj tertremoj pli fortaj ol magnitudo 6. En nia lando estas aktivaj vulkanoj je 7,0 % de la tutmondaj.

Ĝis nun la plej granda katastrofo estis Kantoa Tertremo en 1923. Tiam mortis pli ol 100 000 homoj en Tokio kaj Kanagavo.

Due granda estis Tertremo kaj Cunamo en Nord-Orienta Parto de Japanio en 1896. Forpasintoj estis ĉ. 22 000 homoj. La cunamo atingis 38,2 metrojn alten.

Trie granda estis la tertremo en Nord-Orienta Parto de Japanio en 2011. Forpasis 20 629 homoj. Tio restas ankoraŭ klara en nia penso. Tiam multaj mortis pro cunamoj, sed klariĝis ankaŭ suferoj pro la atomcentralaj akcidentoj. Tio estas novtipaj damaĝoj.

Kvare granda estis la tertremo de Noobi (Gubernioj de Gihu, Aiĉi kaj Mie) en 1891. Mortis 7273 homoj. Post tiu tertremo komenciĝis studoj por preventi damaĝojn de la tertremoj: estis malfacile antaŭvidi okazontajn tertremojn, sed oni devas konstrui domojn pli fortajn kontraŭ tertremoj ktp.

Kvine granda estis la tertremo en Hanŝin-Aŭaĵi en 1995, pro kiu mortis 6437 homoj. Post la tertremo klariĝis ke detruigis multaj domoj konstruitaj antaŭ 1982, en kiu jaro oni ekhavis leĝon konstrui pli fortikajn domegojn.

Tiel klariĝis ke pliboniĝas la rimedoj kontraŭ grandaj katastrofoj.

Sed ĉi-jare rimarkinde multe okazis kaj okazas naturaj katastrofoj malgraŭ tiaj kontraŭrimedoj.

Vintre multege neĝis en la distrikto Hokuŝiku. Temperaturo estis ege malalta. Multaj pasaĝeroj estis enfermitaj en trajnoj sub neĝado. Multaj aŭtoj ne povis veturi kaj homoj devis resti en aŭtoj sub neĝblovado. Lernejoj estis fermitaj, ĉar lernantoj ne povis veni al lernejoj.

En januaro erupciis vulkano de Motoŝirane en la gubernio Gunma. Mortis unu kaj vundiĝis kelkaj.

En aprilo okazis la tertremo en la okcidenta parto de la gubernio Ŝimane. Ĝia magnitudo estis 6,1. Pli ol 1000 domoj havis damaĝojn.

En junio okazis tertremo en la norda parto de Osako. La magnitudo estis 6,1. Mortis 5 homoj; vundiĝis 435 homoj; forfalis, aŭ duone difektiĝis pli ol 40 000 domoj.

Tajfunoj atakis Japanion: la 12a tajfuno en julio kaj aŭgusto; la 20a kaj la 21a tajfunoj en aŭgusto: pro tiu lasta mortis 9, vundiĝis 467, tute aŭ parte difektiĝis pli ol 1000 domoj.

En septembro okazis tertremo en Hokkajdo. Ĝia magnitudo estis 7. Pro tio mortis 41 homoj. Vundiĝis ĉ. 600. Difektiĝis pli ol 60 domoj.

En junio kaj julio pluvegis pro tajfunoj en okcidenta parto de Japanio (Kjuŝuo, Ĉuugoku-Ŝikoku, Kinki kaj Ĉuubu, Hokkajdo). Okazis inundoj, defalego de tero. Mortis pli ol 200 homoj.

Kial okazis tiel multaj katastrofoj? Unue pro fortaj ventegoj rande de Pacifika Alta Aeropremo. Due, la temperaturo de mara surfaco estas pli varma ol en aliaj jaroj. Trie okazis multaj tajfunoj.

Okazis ĉi-jare ne nur naturaj katastrofoj sed daŭris ankaŭ tagoj kun eksterordinare varmegaj tagoj. Pluvsezono finiĝis pli frue ol en ordinara jaroj, en la 29a de junio en nia distrikto (22 jarojn pli frue ol ordinare), kaj do la somero komenciĝis pli frue ol ordinare. Daŭris varmegaj tagoj, en kiuj ni vivis kaj vivas ne komforte. Antaŭe oni rekomendis ne tiel multe uzi klimatizilon por ŝpari elektron, sed ĉi-jare per televido kaj radioelsendo oni daŭre rekomendas uzi klimatizilon senhezite por preventi malfortiĝon de la korpo kaj menso pro varmego. Pri tia ŝanĝiĝo de la sinteno perturbas nin, ĉu vere ni povas senhezite uzi klimatizilon, aŭ ni devas pripensi kaj deteni nin pri troa uzo de elektro.

Kiel vivi? Ja estas malfacila demando. Ja tiel estis kaj estas ĉi-jara somero en Japanio.